post = *après, dans [pour situer dans le temps]* post kelkaj minutoj = *dans quelques minutes*

frue = *tôt, de bonne heure* **malfrue =** *tard* **matene =** *dans la matinée* **vespere =** *dans la soirée*

Frazoj :

En mia dormoĉambro estas vekhorloĝo kaj mi havas ankaŭ brakhorloĝon. Mia avo havis poŝhorloĝon.
Unu semajno konsistas el sep tagoj: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo.
La tero iras ronde ĉirkaŭ la suno. La luno rondiras ĉirkaŭ la tero.

Kioma horo estas? La malgranda montrilo estas inter 1 kaj 2. La granda montrilo estas sur 9. Estas la unua kaj tri kvaronoj (unu kvarono konsistas el dek kvin minutoj) aŭ estas tri kvaronoj post la unua.
Unu minuto konsistas el sesdek sekundoj.
30 (tridek) estas la duono de 60 (sesdek). La dekono de 100 (cent) estas 10 (dek).
30 (tridek) estas la duoblo de 15 (dek kvin). La dekoblo de 10 (dek) estas 100 (cent).
4 plus 6 estas 10. 18 minus 6 estas 12.
La policistoj biciklas duope; la hirundoj flugas duope. La gelernantoj iras al la lernejo multope.

Je la sesa horo, la vekhorloĝo sonoris. Karlo saltas el la lito. Li ĉiam frue vekiĝas ĉar matene ne ŝatas resti en la lito.
Je la sepa horo, la geknaboj matenmanĝos kune. Ili ŝatas kafon aŭ ĉokoladon kun lakto.
La hundo manĝos supon. Ĝi ŝatas promeni sur la kamparo.

Antaŭ kelkaj tagoj la geknaboj estis en Tirolo. Hodiaŭ ili vojaĝas tra la Balkanoj. Post kelkaj tagoj ili estos en Moskvo.
Vespere ili estos lacaj. Tiam ili trinkos varman kafon kaj bone ripozos en dolĉaj litoj.
La geamikoj akompanis ilin ĝis la aviadilejo. Post kelkaj minutoj ili vojaĝos per granda aviadilo. Ili ne timas.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
akompani	*accompagner*	minus	*moins (soustraction)*
antaŭ	*avant, devant*	minuto	*minute*
aviadilo	*avion*	peco	*morceau*
ĉirkaŭ	*autour de*	plus	*plus (addition)*
ĉokolado	*chocolat*	pluvo	*pluie*
dimanĉo	*dimanche*	post	*après*
dolĉa	*doux*	preta	*prêt*
frue	*tôt*	sabato	*samedi*
hirundo	*hirondelle*	salti	*sauter*
ĵaŭdo	*jeudi*	ŝati	*apprécier, aimer*
je	*à*	sekundo	*seconde*
kafo	*café*	semajno	*semaine*
kamparo	*campagne*	supo	*soupe*
kelkaj	*quelques*	tra	*à travers, au travers de*
konsisti (el)	*se composer (de)*	veki	*réveiller*
lundo	*lundi*	vendredo	*vendredi*
mardo	*mardi*	vetero	*temps (qu'il fait)*
merkredo	*mercredi*		

Junulkurso – leciono 13

ĉio = *tout* **ĉiu =** *chaque* **ĉiuj =** *tous*

...ano = *indique l'appartenance (membre, partisan, habitant...)* kongresano, Parizano, urbano, kamparano...

...estro = *chef* ŝipestro = *capitaine d'un navire* urbestro = *maire* muzikestro = *chef d'orchestre*

pro = *à cause de* Mi ridas pro via grimaco. **apud =** *auprès de* **se =** *si, à condition que*

...us = *verbe au conditionnel :* *Attention ! La construction diffère du français : les deux verbes sont au conditionnel.*
Se mi est**us** riĉa, mi aĉet**us** belan domon. = *Si j'étais riche, j'achèterais une belle maison.*

...u = *verbe au volitif (impératif et subjonctif) :* *exprime un ordre, un désir, un souhait.*

Ven**u**!	Bonvol**u** veni!	Mi deziras, ke vi ven**u**.	Li ven**u**.	Ni ir**u**!
Viens, venez !	*Veuillez venir.*	*Je désire que vous veniez.*	*Qu'il vienne !*	*Allons !*

Frazoj :

Sur la turo estas horloĝego. La tramo pasas sur la maldekstra strato antaŭ kukejo kaj magazeno.
Sur la trotuaroj estas elektrolampo, gaslampo kaj budo. La domo de la trinkejo havas balkonon. Antaŭ la restoracio estas tabloj kaj seĝoj. Aŭtobuso estas antaŭ garaĝo.

Se estus supo sur la tablo, la geknaboj manĝus. Se ĉiu homo lernus esperanton, ĉiu povus havi geamikojn sur la tuta tero.
Nenio estas sur la tablo; ĉio estas en la ŝranko: kolbasoj, botelo, glasoj, teleroj...
La hundo estas malkontenta pro la varmeco de la supo. Se la hundo povus, ĝi manĝus la kolbasojn.
Kiam ĉio estos sur la tablo, tiam ili manĝos ĉar ili malsatas. Ĉiu havos teleron kaj ĉiuj manĝos.
Estas vespere. Ĉiuj vespermanĝas. Post kelkaj minutoj ĉio estos en la stomakoj.

Membro de familio estas familiano. En la urbo loĝas la urbanoj. Sur la kamparo la kamparano laboras per forkego.
Ĉiuj estroj gvidas kaj ordonas. La urbestro prezidas ceremoniojn. La muzikestro gvidas per bastoneto.
La ŝipo dronas pro mallerta ŝipestro.

En Pekino, la geknaboj ne povas legi eĉ unu ĉina vorton sed ili petas lin, ke li traduku ĉion.
La geknaboj vizitas Tokion per tirĉareton. Du viglaj viroj tiras la veturiletojn kaj kuretas.
La geknaboj ne komprenas eĉ unu signon de la japana skribo.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
apud	*à côté de*	lerta	*habile, adroit, leste*
atendi	*attendre*	magazeno	*magasin*
aŭtobuso	*autobus*	membro	*membre*
balkono	*balcon*	moroj	*mœurs*
budo	*baraque, kiosque, cabane, stand...*	nenio	*rien*
ĉaro	*char, chariot, charrette*	nun	*maintenant*
ceremonio	*cérémonie*	ordoni	*ordonner, commander*
cilindro	*cylindre*	peti	*demander (qqch...), prier de...*
ĉio	*tout*	prezidi	*présider*
ĉiu	*chaque, chacun*	pro	*à cause de*
ĉiuj	*tous*	respubliko	*république*
droni	*se noyer, couler, sombrer*	restoracio	*restaurant*
eĉ	*même*	se	*si (condition)*
elektro	*électricité*	signo	*signe, caractère*
garaĝo	*garage*	ŝoseo	*chaussée*
gaso	*gaz*	stomako	*estomac*
kolbaso	*saucisse*	traduki	*traduire*
komenci	*commencer*	tramo	*tramway*
konsenti	*consentir, accepter, être d'accord*	trotuaro	*trottoir*
kuko	*gâteau*	vigla	*dispos, allègre, actif, vigilant...*

Junulkurso – leciono 14

si, sin = *se* *pronom réfléchi de la troisième personne (au singulier ou au pluriel) ; ne peut être que complément.*
Li, ŝi, ĝi, ili lavas sin. Li, ŝi, ĝi, ili pensas nur pri si.
sia, sian = *son, sa, ses, leur, leurs... adjectifs possessifs se plaçant devant un complément.*
Li, ŝi, ĝi, ili lavas sian kapon. Li, ŝi, ĝi, ili pensas nur pri sia manĝo.

...ilo = *outil* kombilo = *peigne* razilo = *rasoir* korktirilo = *tire-bouchon* balailo = *balai*
tranĉilo = *couteau* segilo = *scie* prenilo = *tenaille* hakilo = *hache*

antaŭ = *devant* ≠ **malantaŭ** = *derrière* **interne =** *à l'intérieur* ≠ **ekstere =** *à l'extérieur*

nun = *maintenant* **ofte =** *souvent* **kvankam =** *bien que, quoique*

ambaŭ = *tous les deux, ensemble* Karlo kaj Johanino ŝatas vojaĝi. Ambaŭ vojaĝas ĉirkaŭ la mondo.

Frazoj :

Vespere Karlo lavas sin. Li lavis sian kapon. Nun li lavas sian korpon per malvarma akvo kaj sapo. Poste li viŝos sin per seka tualettuko kaj li lavos siajn dentojn per broseto. Li ne razos sin ĉar li ankoraŭ ne havas barbon. La hundo banas sin en metala kuvo. Karlo kaj lia hundo faras sian tualeton. Johanino kombas siajn harojn per broso kaj kombilo. Ŝi rigardas sian vizaĝon en la spegulo. Ŝia rubando kuŝas sur la tablo. Ŝia parfumbotelo staras sur la tablo. La geknaboj ofte lavas sin.
Karlo: « Mi montras mian novan kaskedon kaj ŝi montras sian belan tulipon. »
Johanino: « Mi montras mian belan tulipon kaj li montras sian novan kaskedon. »
En la dua bildo, Karlo montras ŝian belan tulipon, kaj Johanino montras lian novan kaskedon.
La hundo kuŝas sur pajlo en sia dometo. La kateto staras ekstere. Ambaŭ estas afablaj bestoj.
Hieraŭ Karlo kaj Johanino atingis Aŭstralio per aviadilo. Ili vizitis Melburnon, kiu estas moderna urbo. Paŭlino ĝoje akceptis ilin. En la aŭtomobilo de Paŭlino la hundo elektis bonan sidlokon en la kofro. En aŭstralia arbarego, ili ĝuis mirigan spektaklon. En vastega kaj sovaĝa regiono multaj vegetaĵoj kreskas. Ili vidis kanguruojn, koalojn kaj birdon, kies multkolora vosto havas formo de liro.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
akcepti	*accepter, accueillir...*	moderna	*moderne*
ambaŭ	*tous (les) deux, l'un et l'autre*	mueli	*moudre*
atingi	*atteindre*	pajlo	*paille*
balai	*balayer*	parfumo	*parfum*
bani	*baigner*	praktika	*pratique*
barbo	*barbe*	preni	*prendre*
ĉarma	*charmant, gracieux...*	razi	*raser*
dento	*dent*	regali	*offrir, régaler...*
ekster	*hors de, à l'extérieur de*	regiono	*région*
elekti	*choisir, élire*	rubando	*ruban*
formeti	*enlever*	sapo	*savon*
formo	*forme*	segi	*scier*
grimpi	*grimper*	seka	*sec*
ĝui	*jouir (de), savourer...*	sovaĝa	*sauvage*
haki	*couper à la hache*	spegulo	*miroir*
interne	*à l'intérieur*	spektaklo	*spectacle*
kanguruo	*kangourou*	surmeti	*mettre (un vêtement)*
koalo	*koala*	tro	*trop*
kofro	*coffre*	tualeto	*toilette*
kombi	*peigner*	tuko	*linge*
korko	*liège, bouchon de liège*	vasta	*vaste, ample, étendu, ouvert...*
kvankam	*quoique, bien que*	vegeti	*vivre (plantes), végéter*
lavi	*laver*	viŝi	*essuyer*
liro	*lyre*	vizaĝo	*visage*
loko	*lieu, endroit, place*		
miri	*s'étonner, s'émerveiller...*		

Junulkurso – leciono 15

...ujo = *contenant* monujo = *porte-monnaie* cigarujo = *boîte à cigares* salujo = *salière*

...ingo = *contenant partiel* kandelingo = *chandelier* cigaringo = *porte-cigare* plumingo = *porteplume*

tiel ... kiel = *de la même manière ... que* ... tiel rapide, kiel sia patro = *... aussi vite que son père*

tiom ... kiom = *autant ... que* ... tiom da ŝuoj, kiom da piedoj = *autant de chaussures que de pieds*

pli ... ol = *plus ... que* ≠ **malpli ... ol** = *moins ... que* li estas pli granda ol ŝi = *il est plus grand qu'elle.*

la plej ... el ... = *le plus ... de (parmi) ...* la plej serioza el ĉiuj = *le plus sérieux de tous.*

la malplej ... el ... = *le moins ... de (parmi) ...* la malplej multekosta el ĉiuj = *le moins cher de tous.*

super = *au-dessus de* **for =** *loin* li foriras, li estas for = *il s'éloigne, il est loin.*

Frazoj :

Mia monujo estas malplena (bedaŭrinde). Salo estas en la salujo.
Cigarujo tute entenas cigarojn sed cigaringo parte entenas cigaron. Kandelingo parte entenas kandelon.
Mi skribis per plumingo. La martelo frapas la najlon sed ne utilas por ŝraŭbo.
Elefanto estas pli granda ol ĉevalo. Muso estas malpli granda ol testudo.
Elefanto estas unu el la plej grandaj bestoj. Muso estas unu el la plej malgrandaj kaj unu el la malplej utilaj bestoj.
Vekhorloĝo funkcias tiel rapide, kiel murhorloĝo. En la skatolo estas tiom da alumetoj, kiom da cigaroj.

La kato kaŝas sin malantaŭ sitelo.
La kaĝo pendas super la tablo. La kato skuis la kaĝon. Ĉu ĝi kaptis la birdon?
Ne, la birdo forflugis tra la fenestro al la ĝardeno. La inkujo kaj la plumo falis; ili nun kuŝas sur la planko.

La ŝipestro plej afable parolis al la geknaboj en esperanto. Poste la geknaboj rajdis sur belaj ĉevaloj. Ili ŝajnis fieraj.
Sudamerikano ĵetis kaptoŝnuron por kapti sovaĝan ĉevalidon. Karlo tenas sian foto-aparaton.
La hundo ŝajnas maltrankvila: ĝi timas kaj tremas ĉar la serpento levas la kapon super la herbo.
Post momento ĝi forkuros tra la kamparo, tiel rapide kiel sovaĝa ĉevalido. Baldaŭ ĝi estos for.
Ĉu vi ŝatas studi esperanton?
Jes? Vi pravas; mi opinias, ke esperanto estos utila.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
aparato	*appareil, dispositif*	pravi	*avoir raison*
cigaro	*cigare*	rajdo	*course, promenade (à cheval...)*
funkcii	*fonctionner*	salo	*sel*
herbo	*herbe*	ŝajni	*sembler, paraître...*
inko	*encre*	serpento	*serpent*
ĵeti	*jeter, lancer*	sitelo	*seau*
kaĝo	*cage*	skui	*secouer*
kandelo	*chandelle, bougie*	ŝnuro	*corde*
kapti	*attraper, capturer, capter*	ŝraŭbo	*vis*
kaŝi	*cacher*	studi	*étudier*
momento	*moment*	super	*au dessus de*
najlo	*clou*	tiel	*ainsi, si, aussi (comparatif)*
ol	*que (comparatif)*	tiom	*tant, autant*
opinii	*penser (que...)*	trankvila	*tranquille, calme, paisible*
pendi	*pendre*	tremi	*trembler*
plej	*le plus (superlatif)*	utila	*utile*
pli	*plus (comparatif)*		

Junulkurso – leciono 16

Nous avons vu que la lettre **n** *à la fin d'un mot marquait l'accusatif (complément d'objet direct) ; elle sert aussi à indiquer le but atteint par un mouvement, la destination d'un déplacement ; la lettre* **n** *remplace alors la préposition* **al** *:*

kie vi estas? = *où es-tu ?* — kie**n** vi iras? = al kie vi iras? = *où vas-tu ?*

mi loĝas en Parizo = *j'habite (à) Paris* — mi iras Parizo**n** = mi iras al Parizo = *je vais à Paris*

Pour la date, la lettre **n** *remplace la préposition* **dum** *:*

Parizo, la 4a**n** de aprilo = *Paris, le 4 avril* — lasta**n** semajno**n**, mi estis... = *la semaine dernière, j'étais...*

ĉie = *partout* — **pri =** *au sujet de...* — **jam =** *déjà, désormais* — **alia =** *autre, différent*

ĵus = *juste, à l'instant (indique un passé récent)* — **tuj =** *tout de suite (indique un futur immédiat)*

...aro = *groupe* — arbaro = *forêt* — ŝafaro = *troupeau de moutons*

...ero = élément — neĝero = *flocon de neige* — sablero = *grain de sable*

Frazoj :

Sur la bildo, estas montoj kun neĝo kaj glacio. Sub la nuboj estas pluvo kaj fulmotondro.
En la herbo oni trovas edelvejsojn. Kverkoj kaj abioj estas arboj. Apud la rivereto oni vidas kanojn, tendo kaj fajro.

Karlo ĵus ricevis leteron el Parizo. Li malfermis la koverton kaj tuj legis laŭte la leteron: « Parizo, la kvaran de aprilo... ».
Li posedas grandan kolekton da dokumentoj. Li interesiĝas pri la kutimoj, la vivmanieroj de la homoj kaj pri teknikaj progresoj. La interesoj de Johanino estas modo kaj natursciencoj. Ŝi kolektas florojn kaj insektojn. Ŝi ŝatas ricevi poŝtkartojn el la tuta mondo.
Ŝafaro iras sur granda herbejo apud arbaro. La paŝtisto havas veturileton. Malproksime estas fulmotondro: oni vidas fulmojn kaj oni aŭdas tondron.
Neĝas, multaj neĝeroj falas. Neĝa kristalo aspektas tiel, kiel bela steleto. Fajro brulas en ĉiu domo.
Estas multaj saleroj en la salujo sed malpli da moneroj en la monujo.

Johanino kaj Karlo vizitis filmfarejon. Ili vidis kelkajn aktorojn. Teknikistoj filmis komikan scenon uzante multajn aparatojn. Vi ne rajtas tuŝi elektrajn fadenojn !
En Nov-Jorko la geknaboj superflugis la nuboskrapulojn kaj ŝipojn en la haveno. Homoj kaj aŭtoj aspektis kiel polveroj.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
abio	*sapin*	kutimo	*habitude, coutume*
aktoro	*acteur*	kverko	*chêne*
alporti	*apporter*	letero	*lettre*
bruli	*brûler*	maniero	*manière, façon*
ĉefo	*chef*	meti	*mettre*
ĉie	*partout*	modo	*mode*
dato	*date*	nubo	*nuage*
densa	*dense*	paŝti	*faire paître*
dokumento	*document*	polvo	*poussière*
edelvejso	*edelweiss*	posedi	*posséder*
fajro	*feu*	poŝto	*poste*
filmo	*film*	pri	*au sujet de*
fulmo	*éclair*	progreso	*progrès*
haveno	*port*	rajti	*avoir le droit de*
helikoptero	*hélicoptère*	ricevi	*recevoir*
insekto	*insecte*	rivero	*fleuve, rivière, cours d'eau*
ĵus	*juste, à l'instant*	sceno	*scène*
kano	*roseau, canne, tige creuse*	skrapi	*racler, gratter*
karto	*carte*	tekniko	*technique*
kolekto	*ensemble, groupe, collection*	tondro	*tonnerre*
komika	*comique, drôle*	tuj	*tout de suite*
koverto	*enveloppe*	tuŝi	*toucher*

Junulkurso – leciono 17

*Les **temps composés** permettent beaucoup de nuances. En espéranto, les participes sont construits avec beaucoup plus de logique qu'en français par exemple. On y retrouve le* **« i »** *du passé, le* **« a »** *du présent et le* **« o »** *du futur.*
Ils nécessitent un peu d'entraînement mais, rassurez-vous, ils peuvent être évités dans beaucoup de cas.
Dans l'ordre chronologique :

Aktivaj participoj *(Participes actifs) :*

...onta = *avant l'action (future donc)* **...anta =** *pendant l'action* **...inta =** *après l'action (passée donc)*

Pasivaj participoj *(Participes passifs) :*

...ota = *avant l'action (future donc)* **...ata =** *pendant l'action* **...ita =** *après l'action (passée donc)*

...ebla = *traduit une possibilité* videbla = *visible* manĝebla = *mangeable*

...ema = *traduit un penchant, une tendance...* laborema = *travailleur* kredema = *crédule*

...inda = *digne de...* vidinda = *à voir* bedaŭrinda = *regrettable*

Esperanto estas lerninda lingvo!

Frazoj :

Ĝirafo, leono, struto, simio, papago, krokodilo kaj tigro estas bestoj el varmaj landoj.

Antaŭ la kapto Karlo estas kaptonta kaj la fiŝo estas kaptota. Karlo sidas sed la fiŝo ankoraŭ naĝas.
Dum la kapto Karlo estas kaptanta kaj la fiŝo estas kaptata. Karlo staras. La fiŝo ŝatus fornaĝi sed ne povas ĉar pendas!
Post la kapto Karlo estas kaptinta kaj la fiŝo estas kaptita. Karlo denove sidas kaj deziras kapti duan fiŝon.
La kaptita fiŝo estas en la korbo, kiu estas en la fluanta akvo. Ĝi ne estas kontenta ĉar komprenas, ke ĝi estas kuirota...

Pluvas. Johanino vidas, ke la pluvo falas en la ĉambron. Ŝi estas fermonta la fenestron. La fenestro estas fermota.
Tuj poste, Johanino estas fermanta la fenestron. Tiu lasta estas fermata.
Kaj nun Johanino estas ferminta la fenestron. Tiu lasta estas fermita.
Nelonge poste Johanino sidante legas. Ŝi tenas malfermitan libron per siaj manoj.

La du gesinjoroj estas manĝemaj. La sinjoro estas ankaŭ trinkema sed lia glaso estas rompita.
La pomo de la sinjorino ne estas manĝebla ĉar enhavas vermon.
La tranĉilo de la sinjoro estas fermebla sed ne tiu de la sinjorino.
La glaso de la sinjoro falis. Ĝi rompis ĉar vitro estas rompebla. La vino ne plu estas trinkebla.

Junulkurso estas leginda libro. Tiu leciono estas lerninda. Oni povas ankaŭ diri: tiu leciono indas esti lernata.
Ĉiuj infanoj indas esti amataj. Ili ĉiuj estas amindaj.

Johanino kaj Karlo vizitis Mez-Afrikon. Nigrulo frapadas sur tamburon. Aliaj estas dancantaj. Kelkaj serpentoj dancas pro la muziko de sidanta nigrulo. La spektaklo estas vidinda.
En Nord-Afriko maroka amiko plej afable pruntedonis sian kamelon. Johanino sidante parolas kun Karlo dum li donas manĝaĵon al la kamelo, karesante ĝin. Ĝi estas tre malsata ĉar ĝi delonge ne manĝis. Ĉio estos rapide manĝata, ĉar la poto estas malgranda. Malproksime, alia kamelo estas videbla.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
denove	*à nouveau*	papago	*perroquet*
deziri	*désirer, souhaiter*	pensi	*penser*
flui	*couler, se déverser, s'écouler...*	pruntedoni	*prêter*
ĝirafo	*girafe*	prunti	*emprunter*
kamelo	*chameau*	rompi	*briser, casser, rompre...*
karesi	*caresser*	simio	*singe*
kompati	*plaindre, compatir à, avoir pitié de*	struto	*autruche*
korbo	*panier, corbeille*		
kuiri	*cuire, cuisiner*		

Junulkurso – leciono 18

Les ***participes actifs et passifs*** *vus dans la leçon 17 peuvent, grâce à la souplesse de l'espéranto, être transformés en* ***substantifs*** *(changer le « a » terminal en « o ») ou en* ***adverbes*** *(changer le « a » terminal en « e »). On a alors :*

...onto, oto, onte, ote *avant l'action,* ...**anto, ato, ante, ate** *pendant l'action,* ...**into, ito, inte, ite** *après l'action*

Manĝonte, li lavas siajn manojn = *avant de manger, il se lave les mains*

Agante, oni povas solvi la problemojn = *en agissant, on peut résoudre les problèmes*

Leginte kelkajn ekzemplojn, vi pli bone komprenas = *après avoir lu quelques exemples, vous comprenez mieux* (ĉu ne?)

...ado = *action qui se prolonge ou se répète* paroli = *parler* paroladi = *discourir*

...igi = *faire, rendre, provoquer une transformation (le verbe formé est transitif)* beligi ion = *embellir qqch*

...iĝi = *devenir, se transformer (le verbe formé est intransitif)* beliĝi = *devenir beau*

eĉ = *même* eĉ se mi volus... = *même si je voulais...* *à distinguer de* « mem » *(lui-**même**) et de* « sama » *(identique)*

ke = *que* mi deziras, ke... = *je souhaite que...* *à distinguer du comparatif* « ol » *et des corrélatifs* « kiu »...

Frazoj :

Jen kelkaj metioj kaj laboristoj: ŝuisto, leter-portisto, mekanikisto, fosisto, buĉisto, ĝardenisto, spicisto, ĉarpentisto.

La vekhorloĝo sonoradas. Ĝi efike vekas min. Mi vekiĝas.
Per unu frapo, oni ne povas facile enigi najlon, sed per frapado oni sukcesas.

Karlo enblovas aeron por dikigi la balonon. La balono dikiĝas. Ĝi povus eksplodi se ĝi tro dikiĝus.
Johanino varmigas la lakton. La lakto varmiĝas.
Ĝi eĉ povas elflui. Feliĉe tio ne okazas tro ofte ĉar Johanino atentas, ke ĝi ne elfluu.
Pro la fumado la plafono nigriĝis. La ŝmiristo blankigas ĝin.

Rigardante la hakotan arbon kaj tenante la hakilon, Karlo pensas: « Ĉu mi povos? »
Karlo iom post iom hakas la arbon. Multaj splitoj saltas kaj falas sur la teron. Hakante, li ŝvitas kaj esperas sukcesi.
Hakinte la arbon, li ripozas. La hakinto fiere rigardas la falitan arbon kaj ĝojas.
La arbo estas transportota kaj segota. La radikoj restas en la tero.
Poste, Karlo forhakos ĉiujn branĉojn. Vintre, kiam la ligno estos seka, Karlo povos hejti la domon.

En Egiptio la geknaboj vidis la piramidojn, postsignon de grava antikva civilizacio, kies konstruado postulis penigan laboron. Bela sarkofago kaj aliaj antikvaĵoj kuŝas antaŭ ili. Ĉio estas vidinda. Nur scienculoj scias traduki hieroglifojn.
En Italio ili vizitis la vidindajn ruinojn de Pompejo kun multaj malnovaj ŝtonoj. Ili estas sidantaj sur azenoj. Tiel ili ne laciĝos dum la grimpado. La vulkano Vezuvo estas videbla ĉe la horizonto. Ĝi ĉiam fumadas.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
aero	*air*	necesa	*nécessaire*
antikva	*antique, ancien*	obelisko	*obélisque*
atenta	*attentif*	peno	*effort, peine*
baldaŭ	*bientôt*	piramido	*pyramide*
bati	*battre, frapper, cogner sur...*	pluraj	*plusieurs*
blovi	*souffler*	postuli	*réclamer, exiger*
buĉi	*abattre (un animal)*	radiko	*racine*
ĉarpentaĵo	*charpente*	ruino	*ruine, désastre*
civilizacio	*civilisation*	sarkofago	*sarcophage*
efika	*efficace, actif*	ŝmiri	*enduire, étendre...*
eksplodi	*exploser, éclater*	spico	*épice*
fosi	*creuser (la terre...)*	splito	*éclat, écharde, paillette...*
hejti	*chauffer (un local, un four...)*	ŝtono	*pierre*
hieroglifo	*hiéroglyphe*	sukcesi	*réussir, avoir du succès*
kapabla	*capable*	ŝviti	*suer*
mekaniko	*mécanique*	transporti	*transporter*
memori	*se rappeler, se souvenir de*	voli	*vouloir*
metio	*métier*	vulkano	*volcan*

Junulkurso – leciono 19

ek... = *indique le début d'une action ou sa soudaineté* ekparoli = *commencer à parler* ekhalti = *s'arrêter brusquement*

dis... = *indique la dispersion* disdoni = *distribuer* disigi = *séparer* dissemi = *disséminer*

...um. = *suffixe « passe-partout », indiquant un rapport vague ; à utiliser faute de suffixe mieux adapté.*
kolo = *cou* malvarma = *froid* plena = *plein* gusto = *goût*
kolumo = *col* malvarmumi = *s'enrhumer* plenumi = *accomplir* gustumi = *goûter*

tamen = *cependant* Li estas maldika sed tamen tre forta = *il est maigre mais cependant très fort*

po = *à raison de (distributif)* Ili ricevis **po** kvin kartoj = *ils reçurent cinq cartes* ***chacun*** *(pas d'accusatif après* po*)*

Frazoj :

Trajno (*aŭ* vagonaro) konsistas el lokomotivo kaj vagonoj. La trajno eliras el la tunelo kaj eniras (en) la stacidomon.
La ŝarĝ-aŭtomobilo atendas ĉe la barilo. Oni vidas boaton apud lumturo kaj velŝipon en la haveno. Oni vidas ankaŭ flagon sur alta konstruaĵo proksima al la hotelo. En la valo bela cervo staras ĉe la bordo de la rivero.

Johanino subite ekvidis multajn florojn. Ŝi tuj surgenuiĝis kaj komencis deŝiri ilin por fari belan bukedon.
Lekantoj estas simplaj floroj sed tamen beletaj. Birdeto staranta sur proksima arbeto ekkantas.
Por akvumi siajn florojn, Johanino elpumpas akvon. La sitelo pleniĝis kaj la akvo disfluas sur la tero.

Matene, la avo semis tritikon; li disĵetis la grenerojn en la teron. Kiam la tritiko estos matura kaj flava, li rikoltos ĝin.
El la tritiko, la muelisto faros belan farunon. Poste, la bakisto bakos bonan panon.
La knabino disdonas la ludkartojn. Ĉiuj ricevis po kvin ludkartoj. La avino serioze atentas pri la disdonado.

La manĝema sinjoro eniris en faman restoracion. Li volis manĝi el ĉiuj pladoj: viandon, legomojn, salaton, deserton...
La manĝemulo gustumis ankaŭ diversajn trinkaĵojn. Post pago de alta sumo la manĝinto malfacile eliris el la restoracio.

En Madrido, la geknaboj ne ŝatis taŭro-ludon sed preferis la geartistojn, kiuj ekdancis pli poste akompanante sin per kastanjetoj kaj gitaro. Ĉar estas varme en tiu loko, la geknaboj tenas ventumilojn.
En Londono, la geknaboj renkontiĝis kun angla esperantisto. Dum Karlo disrompis sian kuketon por doni al sia hundo, la angla amiko montras la monumentaron kaj la faman ponton sur la riverego. Skotoj ludas per stranga muzikilo.

esperanto	*français*	esperanto	*français*
alta	*haut, élevé*	oranĝo	*orange*
areno	*arène, piste, ring*	pagi	*payer*
arto	*art*	plado	*plat*
avenuo	*avenue*	po	*à raison de (quantité)*
baki	*cuire au four*	pumpi	*pomper*
baro	*barrière, obstacle*	rikolti	*récolter, moissonner*
boato	*canot, embarcation, barque*	salato	*salade*
bukedo	*bouquet*	sama	*même, identique, pareil*
ĉeesti	*être présent, assister*	ŝarĝi	*charger*
cervo	*cerf*	simpla	*simple*
deserto	*dessert*	ŝiri	*déchirer, arracher, ouvrir...*
deŝiri	*détacher, cueillir*	sporto	*sport*
diversaj	*divers*	stacio	*station*
fama	*fameux*	stranga	*étrange, curieux*
faruno	*farine*	subita	*subit, soudain, brusque*
flago	*pavillon, drapeau*	sumo	*somme, total*
greno	*grain*	tamen	*pourtant, cependant...*
gusto	*goût*	taŭro	*taureau*
hotelo	*hôtel*	tritiko	*froment, blé*
kastanjeto	*castagnette*	trovi	*trouver*
konkurso	*concours, course, tournoi...*	tunelo	*tunnel*
lekanto	*marguerite*	vagono	*wagon*
lokomotivo	*locomotive*	valo	*val, vallée*
matura	*mûr*	velo	*voile*
menuo	*menu*		

Junulkurso – leciono 20

Frazoj :

La mondo estas tre granda, sed Esperanto malfermis al ni ĝiajn pordegojn kaj detruis ĉiujn lingvajn barojn.
Per Esperanto ni vojaĝis ĉirkaŭ la tero.

Ĉie en la mondo ni renkontis geamikojn. Ĉiam ni komprenis aliajn homojn praktikante la mond-lingvon. Neniam ni sentis nin fremduloj. La mondo estas nia patrolando. Kiel bela estas la mondo kiam geamikoj ĉie bonvenigas vin! Morgaŭ ni revidos multajn el niaj geamikoj en la tutmonda Esperanto-Kongreso.
Tie renkontiĝos centoj da geesperantistoj. Tiam kunsidos nek rusoj, nek francoj, nek ĉinoj, nek angloj, sed nur homoj. Ili diskutos fratece per unu lingvo; tiam realiĝos la granda sonĝo de la homaro: homoj el la tuta tero komprenos unu la alian!
Karaj gejunuloj, jam preparu la dorso-sakojn, venu kun ni renkonte al vivo pli bela, al mondo pacema! Korespondu, per Esperanto, kun multaj gejunuloj. Ankaŭ vi havu amikojn en la tuta mondo!

La avo semis karoton. Li prizorgas ĝin per rastilo. Pluvo kaj suno rapide kreskigas la karoton. Muso rigardas ĝin. La karoto kreskadis, ĝi dikiĝis kaj grandiĝis. Nun ĝiaj folioj povas porti birdeton. Ĝi estas karotego.
La avo tiras la karoton, sed la karoton li ne povas eltiri. Li vokas la avinon. La avino tiras la avon, la avo la karoton, sed la karoton ili ne povas eltiri. Ŝi vokas la filon. La filo venas rapide por helpi la geavojn.
La filo tiras la avinon, la avino la avon, la avo la karoton, sed la karoton ili ne povas eltiri. La filo vokas la knabon. La knabo vokas la knabinon. La knabino vokas la hundon kaj la katon. Ĉiuj tiras por eltiri la karoton.
La kato tiris la hundon, la hundo la knabinon, la knabino la knabon, la knabo la filon, la filo la avinon, la avino la avon, la avo la karoton, kaj la karoton ili sukcesis eltiri. Ĉiuj falas teren, sed ĉiuj ankaŭ ridas, ĉar la karoton ili eltiris.

En Parizo. Niaj geamikoj rigardas la Efel-turon starante sur la teraso de la fama palaco. Tie okazis pluraj pac-konferencoj kaj internaciaj renkontoj. Ili revas pri unu mondo, unu junularo kaj unu lingvo... Esperanto.
En Esperanta mond-kongreso ili retrovas multajn geamikojn, kiuj venis centope el ĉiuj nacioj. Falis lingvaj baroj. Ili ĝojege interparolas per unu lingvo... Esperanto.

Karaj gelernantoj, vi finis la lernadon de la Junul-kurso.
Ni esperas, ke la aventuroj de Karlo kaj Johanino plaĉis al vi.
Atentu, ke lingvo ne parolata estas morta lingvo: praktiku esperanton per gastigado reciproka kun esperantistoj el aliaj landoj! Se vi ne tuj povas vojaĝi, vi ekkontaktu kun la mondo per korespondado.
Vi devas nepre utiligi la materialon, kiun vi amasigis dum monatoj.
Atentu, ke materialo ne zorgata pereas: ellernu esperanton per perfektiga kurso aŭ per legado!

esperanto	*français*	esperanto	*français*
amaso	*tas, amas*	perei	*périr, disparaître*
detrui	*détruire, anéantir*	perfekta	*parfait*
fremda	*étranger*	plaĉi	*plaire*
gasto	*hôte, invité, client, pensionnaire...*	rasti	*râteler, ratisser*
internacia	*international*	reala	*réel*
konferenco	*conférence*	reciproka	*réciproque*
kongreso	*congrès*	revi	*rêve*
kontakti	*établir un contact, contacter*	sendi	*envoyer*
ligi	*lier, attacher*	servo	*service*
materialo	*matériau, matériel, matière...*	teraso	*terrasse, terre-plein*
morta	*mort*	voki	*appeler*
nacio	*nation*	zorgi	*s'occuper de, prendre soin de...*
nepra	*absolu, inéluctable*		
oceano	*océan*		
paco	*paix*		
palaco	*palais*		